Subtenu la informadon

PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Abonu

Pilo - Press

30,-

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 11/78 - 15 mar 1978
Aparas ĉiusemajne

## Letero al la Eŭropa Episkopa Konferenco

Luksemburgo (pp) - Eŭropa Esperanto-Centro Luksemburgo sub la gvidado de H.Kindler-Triksini en letero turnis sin antaŭ nelonge al la membroj de la Eŭropa Episkopa Konferenco en Romo. La letero tekstas:

"Eminencoj, ekscelencoj,

En la nomo de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), kiel ties prezidanteca kandidato kaj kiel estro de eklezia kaj eŭropa Esperanto-Centro, mi havas grandan peton al vi.

Dum mia interparolado kun kardinalo Knox pri la permeso, povi celebri la sanktan meson en la internacia lingvo Esperanto, la prefekto de la kongregacio por ritoj kaj sakramentoj diris al mi , ke ĉi tiu nun ekstarigis novan regularon por la permeso de liturgia lingvo. Antaŭ ĉio iu episkopa konferenco devas proponi ĝin al la Sankta Papo.

Pro tio, ke por la Internacia Lingvo ne estas konsiderebla nacia episkopa konferenco, li konsilis al mi, turni min al la Eŭropa Episkopa Konferenco. Se tiu ĉi proponus ĝin al la papo, ankaŭ li ne havus plu dubojn.

Ĝis tiam la esperantoparolantaj episkopoj kaj sacerdotoj povus ĉion paroli kaj kanti en la Internacia Lingvo krom la kanono, kiu provizore devus resti en la latina. Por la katolika mondkongreso en Ĉenstoĥovo kaj Niepokalanov (alta protektanto kardinalo Wojtila) la permeso estis donita ĝenerale. Ĉar mi estas komisiita, prepari kaj organizi la 38-an IKUE-Kongreson en Luksemburgo 1979, mi estus tre dankema pri baldaŭa decido.

16 milionoj da homoj jam parolas Esperanton, ekzistas 40 000 libroj kaj 100 revuoj, radiostacioj, inter ili Radio Vatikana kaj Romo sendas regule en Esperanto, artistoj de ĉiuj fakoj aplikas ĝin, miloj da urboj, firmaoj, hoteloj ktp. jam uzas ĝin, oni instruas ĝin jam en universitatoj, altlernejoj kaj lernejoj, kaj la Universala Esperanto-Asocio, la monda organizaĵo, estas en daŭra kunlaboro kun UNESKO, kies ĝenerala direktoro dum la lasta kongreso en Rejkjaviko faris bazan paroladon. Ekde longa tempo ĝi kreskas trans Eŭropon. La eklezio ne devus fermi sin plu kontraŭ tiuj faktoj.

Kion mi deziras estas jeno: por ĉiuj kazoj, kie esperantoparolantaj katolikoj kunvenos ie en la mondo, la liturgio devus esti senlime permesita en la Internacia Lingvo, laŭ aprobitaj tekstoj memkompreneble.

La Eŭropa Episkopa Konferenco estas kore petita, pritrakti tiun peton dum sia novembra kunsido kaj fari koncernan proponon al la Sankta Patro.

Se tio ne estus ebla pro tempomanko, eble tiu punkto povus esti metita oficiale sur la tagordon de la venonta kunsido. Mi volonte estos preta, sendi al vi plian informmaterialon kaj ankaŭ paroli mem kun la prezidanto de la konferenco. La episkopo de Luksemburgo jam delonge estas bonege informita pri Esperanto.

Kun firma espero, ke nia peto ne restos sen rezulto kaj kun la invito al vi, Eminencoj kaj Ekselencoj, honori la IKUE-Kongreson 1979 en Luksemburgo per via veno, mi restos kun sindonaj salutoj

H. Kindler."

Peto de la LKK Augsburg

Augsburg (pp) - Esperantistoj kiuj intencos partopreni la venontan Germanan Esperanto-Kongreson dum Pentekosto 1978 en Augsburg estas ege petataj plej eble baldaŭ aliĝi, se ili deziras ioman garantion por kunvena tranoktejo.

En Augsburg samtempe okazas renkontoj de la Germana Geografi-Instruistaro, de la Instruistina Asocio kaj de la Bavara Geinstruista Asocio. "Fremdenverkehrsamt Augsburg" petas la komprenon de la kongresanoj aliĝontaj nur mallonge antaŭ la Kongreso, ke ĝi tiam ne plu povas plenumi ĉiujn specialajn dezirojn rilate al hotelĉambroj.

S. Tucker, LKK-anino

Popularscienca komparo de Esperanto kaj la angla

Augsburg (pp/tk) - En la Esperanto-Centro de Augsburg okazis dum kursvespero la 1-an de marto prelego en germana lingvo pri la temo:

"La arteco de naturaj lingvoj kaj la natureco de artaj lingvoj - demonstritaj per la ekzemplo de Esperanto kaj la angla."

14 personoj, plej parte kursanoj, kun intereso aŭskultis s-inon Stefanie Tucker (studentino pri anglistiko kaj geografio) kiu lerte kondukis la laikojn tra labirinto da faktoj kaj argumentoj, subtenate de modernaj instruiloj. La prezentaĵo estis objektiva kaj kompreniga rigardo al la du lingvoj kun substreko de tio, kion ili havas komunan kaj kio ilin diferencigas. Mankis fanatika fanfaronado pri unu kaj polemiko kontraŭ la alia.

S-ino Tucker, kiu ankaŭ verkis sian diploman eseon por la ŝtata ekzameno pri la komparo de la Esperanta kaj la angla vorttrezoroj, antaŭvideble prezentos la prelegon en popolaltlernejoj de la aŭgsburga ĉirkaŭaĵo.

Certe ĝi ankaŭ taŭgus por prezento dum ekspozicio aŭ informarango.

Eŭropaj balotoj

Mannheim (pp-rr) - Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo (SOGELO) fariĝis membro de la landa komitato de Baden-Württemberg por la eŭropaj balotoj dum la fondkunveno la 9-an de decembro 1977 en la nova kastelo de Stuttgart. Fine de januaro 1978 la landa komisiito por la eŭropaj balotoj, ministro Eduard Adorno, dissendis la liston de la pli ol 100 partioj, institucioj kaj asocioj, kiuj apartenas al la komitato. Sur la listo SOGELO troviĝas inter la Sudgermana Radio kaj la Sudokcidentgermana Ĵurnalista Asocio.

Sogelo petas la grupojn kaj individuajn membrojn de la Ligo, subteni ĝian laboron en la landa komitato. SOGELO alvokas ĉeesti la dimanĉan laborkunsidon en Neustadt, dum kiu SOGELO decidos pri la laborprogramo por la eŭropaj balotoj.

Printempa SOGELO-Tago 1978

Neustadt/Weinstr. (pp) - La 22-an kaj 23-an de aprilo 1978 okazos en Neustadt/Weinstr., naturamika domo, la Printempa SOGELO-Tago 1978. La programo antaŭvidas Laborkunsidon de SOGELO, kursojn por komencantoj kaj progresintoj sub la titolo "Esperanto por la praktiko", la teatraĵon "La hipnoto" de la Pola Esperanto-Teatro kaj dimanĉe la 23-an de aprilo la kunsidon "Eŭropaj balotoj" (Vidu supre!).

Informas Johannes Radam, Osteroder Weg 4, 6800 Mannheim 31.

********************

Aliĝu al la 56-a Germana Esperanto-Kongreso 1978 en Augsburg!

Kongresadreso: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, 8901 Steppach

## La semajna komentario el Aŭstrio

La 4-an kaj 5-an de marto 1978 d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal prezentis jenan semajnan komentarion de d-ro Alfred Macher (ORF):

"Baldaŭ ekvalidos ĉe ni imposto por ŝarĝaŭtomobiloj, ankaŭ por eksterlandaj, kiuj traveturas nian landon, ruinigante ties ŝoseojn, pro plejgrandparte montara tereno speciale multekostajn.

Same baldaŭ, espereble, ekvalidos kontrakto kun la registaro de Irano, pri transpreno de la atom-rubaĵo, post finfina ekfunkciigo de Zwentendorf, t.e. nia unua nuklear-energiejo.

Agrable surprizis la konstato, ke kreskas denove la sumoj, enpagataj de niaj monŝparantoj, pruvo de forta fido al la aŭstria ŝilingo, kiu ja fakte prezentas - apud la svisa franko kaj la germana marko - la plej fortikan monsistemon entute. Tamen ni devas ĝin defendi kontraŭ la disradiantaj efikoj de la ekonomia mondkrizo.

Niaj kamparanoj reduktu la troan produktadon de lakto kaj de tritiko, kies eksporto eblas nur per ŝtataj subvencioj, dolorige premantaj la fiskan bilancon.

Ĉio tio rilatas al la estonteco. Cetere ankaŭ la jeno: Estis publikigata nekrologo pri parlamentano, laŭ famo mortinta. Sed temis pri eraro. Nu, en tiaj okazoj oni diras, ke la koncerna homo vivos des pli longe. Tiun esperon la aliaj deputitoj esprimis per gratul-telegramo al la - kvazaŭ redonita al ili - kolego."

## La liturgia semajna penso

La 12-an de marto 1978 P. Jacobitti prezentis - kadre de la Esperanta programo de la Vatikana Radio - jenan liturgian semajnan penson:

"Se la anonco de la morto de Jesuo estis konsterna por tiuj, kiuj amis lin, ĉar ili metis sian tutan esperon sur lin, la promeso de lia certa venko devis doni al ili konsolan subtenon. Decida kaj memvola fino la unua, ĉar la Filo de Dio enkarniĝis por plenumi nian elaĉeton pere de sia vivofero; sed fundamenta kredo la dua, eĉ kiam Jesuo estos en la tombo.

Ankaŭ la liturgio de ĉi tiu kvina dimanĉo de karesmo havas por ni la saman celon: anonci al ni la certan mortigon de Jesuo pere de liaj malamikoj, jes; sed konfirmi lian finan venkon pere de la resurekto. Ĉiu el ni bezonas ĉi tiun subtenon, ĉar ĉiu el ni devas sekvi lian saman sorton. Fakte la kristanismo pasas tra la kruco, sed ne haltas sur ĝi. Ĝi estas la ponto, kiu kondukas la homaron al la vivo. Ĝi estas la religio de la vivo."

**************

## Jarkunveno de la nederlandaj instruistoj

Schoorl (pp) - La jarkunveno de la nederlanda grupo de geinstruistoj pri Esperanto okazos en la kadro de instrua semajnfino, la 22-an kaj 23-an de aprilo 1978.

Restoracio "De Gastronaut" en la Martinihal Centro Groningen gastigos la partoprenantojn. Komencantoj povos ĉeesti specialan kurson. Infanoj de la enurba kurso sin prezentos. Instancoj pri instruado kaj komunikado estas invititaj.

Ĉiuj estas tre bonvenaj, ankaŭ nemembroj. Detalaj informoj haveblas ĉe la sekretario: Frederikslaan 47 NL-1871 SB Schoorl, Tel. 02209-1565.

**************

## Anonceto

Zamenhof-letero al J.M. Schleyer el 1887 vendebla.

Sendu prezoferton al Sarlanda Esperanto-Ligo,

Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

**Reagoj**

Koran dankon pri via PP 8, kun la tre freŝaj informoj. Via informilo povas doni tiel akurate ilin, ankaŭ pro tio, ke vi sekvas la radio-elsendojn. Ni aparte dankas pro la plena citaĵo el nia leterkesto, kio, laŭ ni, instigos aliajn aŭskulti kaj skribi. Koran dankon!

5.III.78/609 Por la Vatikana Radio J.

***************

Esperanto en Radio

ORF - Vieno: Certe nun la bona aŭskultebleco kaj la konvena tempo instigos esperantistojn aŭskulti kaj skribi. Volonte Pilo-Press aŭdus ankaŭ aliajn nomojn en la leterkesto. - Post la interesa semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni povis aŭdi enkondukan informon pri la broŝuro n-ro 4 "Instigoj al nova monda ekonomi-ordo kaj efika evoluhelpo" de d-ro Josef Hartl, Vieno. Ĉi tiu informo estos daŭrigita! El tiu artikolo ni mallonge citas:"Grava malhelpo al justa monda ekonomi-ordo estas la ekzisto de monopoloj, ĉar justajn prezojn ebligas nur libera konkurencado. Do necesas dissolvo de la diversaj kateloj por krudaj materialoj kaj internacia konvencio pri justa kalkulado. Se la naturaj riĉaĵoj de nia terglobo devas aparteni al ĉiuj, tiam ili devas esti senkostaj kaj ne venditaj aŭ uzitaj kiel armiloj."

Svisa Kurtonda Radio: Por majo 1978 d-ro A. Baur anoncis jam ŝanĝojn en elsendo-ritmo de Svisa Radio. Oni ja aŭdos la svisajn elsendojn sesfoje en la semajno, sed nur je 3 tagoj, ĉiutage do dufoje. Sed ĝustaj anoncoj sekvos en la nun prilaborata bulteno. - D-ro A. Baur raportis pri la Svisaj Esperanto-Tagoj, je la 4-a kaj 5-a de marto en Baden. Restis prezidanto de SES vole-nevole Otto Walder. Sed oni antaŭvidas la nunan vicprezidanton, hungardevena sviso la novan prezidanton venontjare. D-ro A. Baur ankaŭ raportis pri 4 svisaj plebiscitoj!

Pekino: Tiu stacio aktuale kaj detale raportis pri la partia kongreso kaj ĝiaj sekvoj kaj raportoj. Tre bone aŭdeblaj elsendoj en Pekino!

Romo: La elsendo estis en la aero, sed nur malfacile komprenebla. Ni kaptis ĝin je 41,24 metroj (7275 khc.) Espereble aliaj havas pli bonan rezulton.

Radio Vatikana: La samtempeco de tiu stacio kun Romo estas ĝena, speciale pro la fakto, ke Romo estas malfacile aŭdebla. Des pli bone ni aŭdis denove la Vatikanan Radion sur mezondo najbare al Varsovio. La programo detale raportis pri la tabelo de la Sanktaj Semajnaj Ritoj gvidataj de la Sankta Patro. Laŭ ĝi la Papo celebros dimanĉe, la 26-an de marto, je la 10,45 h la sanktan meson el la antaŭplaco de la Vatikana Baziliko, kaj je la 12-a horo li donos la Papan benon "Urbi et Orbi", tio estas, al la Roma urbo kaj al la tuta mondo, el la centra loĝio de la Baziliko.

Portugala Radio: Vane ni provis dimanĉe kapti unu el la 5 elsendoj. Kiu sukcesis?

Pola Radio: Tiu stacio enkondukis ŝanĝojn en la kadra programo. Ĉiu aŭskultanto devas mem decidi, ĉu plaĉas al ili tiuj ŝanĝoj. Pilo-Press ekz. bedaŭras, ke estonte ni ne plu aŭdos la rubrikon "El la temoj de la semajno", kiun verkis ĝenerale la estro de la Esperanto-redakcio. Ankaŭ la rubriko "El la vivo de PEA" la redakcio disaŭdigos nur, se vere interesa novaĵo estas informenda. Certe en tiu punkto la redakcio pravas, ĉar bedaŭrinde gravaj informoj el la vivo de la Esperanto-movado ofte mankas. En la pasinta leterkesto la redakcio diris, ke al 90 % de la informoj kaj artikoloj de Pilo-Press la redakcio povas konsenti. Tamen ni konstatas, ke dum la pasintaj monatoj en la Esperanto-Ekspresoj oni ne plu aŭdis la rubrikon "Novaĵoj el Pilo-Press". Sed lasttempe entute mankas tiaj rubrikoj. Ŝajnas ke en la Esperanto-Ekspreso ankaŭ okazas ŝanĝoj. Sed estas la demando, ĉu la nomo "Esperanto-Ekspreso" ankoraŭ estas aktuala kaj praviga! Rilate al la polajtemoj kaj mondaj eventoj Pola Radio ĉiam estas aktuala.